

20^a Alp-Adria Esperanto- Konferenco

Temo: Alp-Adrio kaj Danubio
Bjelovar, 8-10 de junio 2018



20^a esperantska konferencija Alpe-Jadran

Tema: Alpe-Jadran i Podunavlje
Bjelovar, 8.-10. lipnja 2018.



KONFERENCA libro



Bjelovar
8-a – 10-a de junio 2018



Organizantoj:

Bjelovara esperantista societo
Alp-Adria Esperanto-Rondo



Aŭspicianto:

Departemento Bjelovar-Bilogora

Eldonis: *Bjelovara esperantista societo*
Respondeca redaktoro: *Franjo Forjan*
Teknika redaktoro: *Josip Pleadin*



Salutmesaĝo de la departementestro

Estimataj konferencanoj,

Mi estas tre kontenta por povi saluti vin okaze de la 20-a Esperanto-konferenco de Alp-Adrio, kies aŭspicianto estas la Departemento Bjelovar-Bilogora. Des pli mi ĝojas, ke tiu valora evento okazas enkadre de la festado de Tago de nia departemento.

Unuavice mi devas laŭdi ĉion, kion faras Bjelovara esperantista societo. Ekzemple, malantaŭ ni restis, interalie, la Esperanta festivalo INTER-FEST, kiu pasintjare daŭris sep tagojn kaj kunvenigis multajn partoprenantojn kaj la lokan publikon, kaj la Departemento Bjelovar-Bilogora aŭspiciis ĝin.

Via 20-a Esperanto-konferenco de Alp-Adrio estas superkonstruo de jam okazintaj Esperantaj manifestacioj en nia departemento, kaj estas nia granda honoro, ke ĝuste Bjelovara esperantista societo gastigos ĝin, ĉar ĝi estas via jubilea aranĝo. Mi invitas ĉiujn interesiĝantojn aliĝi al la konferenco: kaj la parolantojn de Esperanto, kaj tiujn, kiuj ne konas ĝin, sed eble deziras ekscii kion Esperanto ofertas kaj kiel funkcias ĝia granda familio disvastiĝinta tra la mondo.

Evidentas, ke Esperanto kunigas homojn, senkonsidere pri iliaj raso aŭ lando, kaj ke ĝi estas bonega propono por solvi la problemon de interkompreniĝo en la mondo kaj rimedo por pli bonaj rilatoj inter la popoloj.

Al ĉiuj partoprenantoj mi deziras sukcesan laboron dum la tritaga konferenco, kaj al la unuafojaj gastoj de la departemento Bjelovar-Bilogora mi deziras agrablan restadon kaj belajn memorojn pri nia regiono.

La departementestro,
Damir Bajs, diplomita juristo



Salutmesaĝo de la urbestro

Estimataj konferencanoj, karaj esperantistoj,

Bonvenon al Bjelovar, pri kiu ni povas fiere aserti, ke ĝi estas multkultura urbo. Ĝi estas la urbo, kiu la Esperantan tradicion vartas jam pli ol unu jarcenton. Ĝia esperantista societo estas tre aktiva, ĝi organizas kvalitajn aranĝojn, kaj ĉi-jare vi akceptis ĝin por gastiganto de la Esperanto-konferenco de Alp-Adrio, kiu okazas la jubilean, dudekan fojon.

Ĝis nun en Kroatio viaj konferencoj okazis kvar fojojn, sed ĉi tiu estas la unua okazigo de via aranĝo en la kontinenta parto de Kroatio, ĝuste en nia bela urbo, kio vere ĝojigas nin.

La ĉefa konferenca temo *Alp-Adrio kaj Danubio* ĉi-momente gravas pro la fortigo de la sento pri komuneco kaj reciproka kunlaboro inter la popoloj de ĉi tiu regiono. Nuntempe gravas ankaŭ koni ĉiujn ŝanĝojn surkampe de informado, por kiel eble plej multe konservi korektan informadon en la intereso de la publiko, kaj ne nur en la servo de la merkataj leĝoj, al kio estas dediĉita via dua konferenca temo.

Mi kredas, ke la Bjelovara esperantista societo estos via bona gastiganto kaj ke la konferenco estos sukcesa kaj utila.

Ĝuu nian belan urbon! Bonvenon!

La urbestro,
Dario Hrebak



Salutmesaĝo de la Esperanto-Rondo de Alp-Adrio

Estimataj konferencanoj,

Mi bonvenigas ĉiujn esperantistojn el la Alp-Adria kaj Danubia Regionoj al tiu ĉi nia 20-a Konferenco en bela Bjelovar kaj kore dankas la lokan esperantistaron kaj aparte Josip Pleadin pro la invito renkontiĝi kaj festi en speciala etoso tiun ĉi datrevenon, kiu havas apartan signifon por ni ĉiuj.

Niaj Konferencoj datiĝas de la jaro 1989, kaj nun, post 29 jaroj, ni sukcesis atingi la 20-an konferencon. Tio jam donas al vi indikon, ke la vivo de nia Esperanto-Rondo ne estis ĉiam glata kaj senproblema. Ja, dum tiu periodo milito okazis, ekonomio malboniĝis, multaj politikaj situacioj ŝanĝiĝis, strukturo de la ŝtatoj modifiĝis. Bonŝance kaj malgraŭ ĉio, la rilatoj inter ni esperantistoj restis bonaj kaj kunlaboremaj, klopodoj por daŭrigi agadon por Esperanto laŭ la diversaj eblecoj ne haltis, amikeco kaj kontaktoj fluis regule. Kaj tion ni ŝuldas al la internacia neŭtrala lingvo Esperanto, kiu kunligas niajn animojn kaj sentojn!

En antaŭa Konferenco en Brežice, la temo estis ĝuste la iniciatinto de Esperanto, nia Majstro Ludoviko Lazaro Zamenhof, kies 100-jara morto-datreveno inspiris la esperantistaron de la tuta mondo. Ĉi tie, en Bjelovar, la temo estas pli ampleksa, ĉar niaj teritorioj estas vastaj kaj tre malsimilaj, kunligitaj per historiaj faktoj ekde jarcentoj. Ni klopodu alporti vidpunkton, personan bildon kaj opinion, por pliriĉigi nian kunestadon.

Dankon por via ĉeesto kaj aktiva partopreno. Nia 20-a Konferenco donu elanon por nova, vigla kaj sukcesa agado por nia komuna afero.

Sekretario de
Esperanto-Rondo de Alp-Adrio
Edvige Ackermann



Alp-Adria Esperanto-Konferencoj

1-a: 1989 Arnoldstein (Aŭstrio). Temo: *Esperanto en la Alp-Adria laborkomunumo.*

2-a: 1990 Kőszeg (Hungario). Temo: *Kultura kunlaborado pere de Esperanto en la Alp-Adria laborkomunumo.*

3-a: 1991 Pécs (Hungario). Temo: *Amika renkonto – Ĉu ekflagros milito?*

4-a: 1992 Poprad (Slovakio). Temo: *Evoluado de Esperanto-aktivado post la reĝustigo de la geografia situacio.*

5-a: 1993 Maribor (Slovenio). Temo: *Literatura kunlaborado inter la popoloj de la Alp-Adria areo.*

6-a: 1994 Trieste (Italio). Temo: *La popoloj de Alp-Adria renkontiĝas, interparolas kaj tuj ekfloras amikeco.*

7-a: 1995 Szombathely (Hungario). Temo: *Komerco kaj Esperanto en la Alp-Adria regionoj.*

8-a: 1996 Ljubljana (Slovenio). Temo: *Unueco en diverseco.*

9-a: 1997 Crikvenica (Kroatio). Temo: *Naturo – nia vivtrezorejo.*

10-a: 1998 Lignano Sabbiadoro (Italio). Temo: *Instruado de Esperanto.*

11-a: 1999 Pula (Kroatio). Temo: *Kulturaj rajtoj de etnaj malplimultoj en Alp-Adria Laborkomunumo.*

12-a: 2000 Ptuj (Slovenio). Temo: *Turismo kaj Esperanto.*

13-a: 2001 Trieste (Italio). Enkadre de la 70-a Itala kongreso de Esperanto.

14-a: 2002 Rijeka (Kroatio). Enkadre de la 5-a kongreso de kroataj esperantistoj.

15-a: 2005 Trieste (Italio). Temo: *Adriatika maro, renkontiĝejo de lingvoj kaj kulturoj diversaj.*

16-a: 2012 Trieste (Italio). Enkadre de la Internacia Eŭropa Konferenco.

17-a: 2013 Izola (Slovenio). Temo: *Paca kunvivejo de tri kulturoj.*

18-a: 2015 Opatija (Kroatio). Temo: *Adria maro, maro de Mezeŭropo.*

19-a: 2017 Brežice (Slovenio). Temo: *130 jaroj de Esperanto-Movado, 100-jariĝo de Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj Alp-Adriaj Regionoj.*

20-a: 2018 Bjelovar (Kroatio). Temo: *Alp-Adrio kaj Danubio.*

De Arnoldstein ĝis Bjelovar



Bjelovara esperantista societo preparis malgrandan porokazan ekspozicion titolitan *De Arnoldstein ĝis Bjelovar – la urboj gastigantoj de Alp-Adriaj Esperanto-Konferencoj*, kiu viziteblas en la Popola biblioteko *Petar Preradović*, Trg Eugena Kvaternika 11 inter la 1-a kaj 15-a de junio. La ekspozicio estas ĉefe dediĉita al la urboj de Bjelovar.

Koncize pri la departemento

La Departemento Bjelovar-Bilogora (*Bjelovarsko-bilogorska županija*) situas en la nordokcidenta parto de la lando. Ekonomie ĝi estas la plej forta agrikultura departemento de Kroatio. La departemento okupas 2652 kvadratkilometrojn, kaj en ĝi vivas proksimume 3 % de la enlanda loĝantaro. Sur ĝia teritorio vivas ĉirkaŭ 140.000 loĝantoj kun la denseco de 50 loĝantoj je kvadratkilometro. Ĝia loĝantaro konsistas el 82,6 % da kroatoj, 7,1 % da serboj, 5,3 % da ĉeĥoj, 0,9 % da hungaroj kaj la cetero estas aliaj nacioj kaj etnoj. En la departemento vivas plej multaj ĉeĥoj en Kroatio (ĉefe en Daruvar kaj Grubišno Polje), kiuj sukcesis konservi siajn kulturon kaj lingvon. Bjelovar estas administra, kultura kaj ekonomia centro de la departemento. Sur ĝia teritorio troviĝas 5 urboj (Bjelovar, Čazma, Daruvar, Garešnica kaj Grubišno polje) kaj 18 komunumoj.

La departement flago



La departementa sidejo

Koncize pri la urbo

Bjelovar estas administra, politika kaj kultura centro de la Departemento Bjelovar-Bilogora kaj sidejo de la Diocezo Bjelovar-Križevci. Ĝi estas unu el la plej junaj urboj en Kroatio, fondita per dekreto de la imperiestrino Maria Theresia en 1756. Laŭplane konstruita kiel armea kaj administra centro de la limregionaj regimentoj de Križevci kaj Đurđevac, ĝi posedas regulan strukturon de la stratoj en la urbocentro. En la urbo ekzistas plurjarcenta tradicio de lakto- kaj fromaĝ-produktado, kaj kelkfoje oni nomas ĝin „fromaĝurbo”. En ĝi vivas ĉirkaŭ 42.000 loĝantoj kaj ĝi inkluzivas 31 vilaĝojn.



La nova historio de Esperanto en Bjelovar komenciĝis per la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en 2011 kaj tuj posta (re)fondo de Bjelovara esperantista societo, kiu organizis ankaŭ la nunan jubilean konferencon de Alp-Adrio.

Esperanto en Bjelovar kaj ĝia regiono



*Fran Kolar-Krom kaj Vilim Polašek –
verŝajne la plej gravaj bjelovaraj esperantistoj.*

Bjelovar havas longan kaj riĉan tradicion de Esperanto, kiu komenciĝis proksimume samtempe kun la fondo de Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj (UKE) en Zagrebo, la unua tutlanda Esperanto-asocio. La ĉefa bjelovara esperantisto el tiu pionira periodo estis la financa konsilisto **Fran Kolar-Krom** (Sedlarica 1877 – Zemun 1927), kiu lernis Esperanton en Zagrebo en 1905 kaj pro sia ofico translokiĝis al Bjelovar kaj rapide organizis la unuan esperantistan grupon. Kvankam ĉiuj dokumentoj el tiu periodo malaperis, ni povas iomete rekonstrui la historion surbaze de presitaj fontoj. Malgranda artikolo ekzistas en *Kroata Esperantisto* (n-ro 2/1909):

„La 17-an de aprilo estis nia unuiĝkomitato en Bjelovar, kie nia prezidanto kune kun la tiea fervora esperantisto S-ro Franjo Kolar havis paroladon pri Esperanto. Tuj fondiĝis grupo, kiu hodiaŭ konsistas el 60 distingitaj anoj kun jena komitato: Franjo Kolar, prezidanto, Julije Ivanković, vicprezidanto, Milan de Dawidowsky, sekretario, Slava Kolar, kasistino; Milan Krleža, Albert Berkeš,

Martin Pavelić, Rudolf Žličar, komitatanoj. La 27-an de aprilo estas malfermita lernokurso, en kiu instruadas la prezidanto mem. Imitinda ekzemplo por aliaj urboj de nia patrujo! Nian bondeziron kaj feliĉan sukceson!”

Tiu artikolete estis la sola informfonto pri tiu epoko, kaj la alian fonton prezentas la loka gazeto *Nezavisnost*, kiu havis Esperanto-rubrikon, sed kiun bedaŭrinde neniu detale trastudis. Analizante la rubrikon de *Nezavisnost*, mi konstatis, ke la unua artikolo en ĝi aperis la 5-an de decembro 1908. Sekvas ĝin la jena artikolo:

„ESPERANTO. Sabate, la 17-an de ĉ. m. je la 18h30 okazigos la membro de Kroata "Sokol", frato Fran Kolar, en la sokola salono (gastejo "Kruna") prelegon pri Esperanto. Kompleze al Kroata "Sokol" alvenos ankaŭ la prezidanto de kroataj esperantistoj el Zagrebo, sinjoro Mavro Špicer, patrujdefenda financa konsilista aspiranto kaj prelegos pri: praktika uzebleco de Esperanto”. (n-ro 20, la 10-an de aprilo 1909, paĝo 4).

Du semajnojn post tiu evento, la 1-an de majo 1909, en sia 22-a numero sur paĝo 8, la redakcio aperigis la jenan artikolon:

„Societo de kroataj esperantistoj en Bjelovar. – Ni ĝojas ĉi-maniere informi, ke en nia urbo estas fondita societo de kroataj esperantistoj. Ni ĝojas eĉ pli, ĉar ni estas post Zagrebo la unua urbo en la provinco kiu komprenis la grandiozan ideon de tiu lingvo. Pasintan sabaton en la ejo de Kroata "Sokol" okazis prelego, kiun kune kun respektinda nombro da amikoj de Esperanto, partoprenis ankaŭ la prezidanto de kroataj esperantistoj el Zagrebo, sinjoro Mavro Špicer, kune kun la tuta komitato de zagrebaj esperantistoj. Post la prelego okazis en la gastejo "Tome" neformala amika vespero, kie la zagrebaj gastoj tre agrable amuziĝis per kantado de hejmlandaj kantoj tradukitaj al Esperanto kaj per konatiĝo kun ĉi-tieaj kondiĉoj. La societo de kroata "Sokol", frunte kun sia estro, frato D-ro Strižić, helpis la diligentajn propagandistojn de Esperanto, promesinte ankaŭ estonte subteni ilian laboron dediĉitan al konigo de kroata nomo en la tuta kultura mondo. Tre agrablan impreson lasis la zagrebaj vizitantoj inter la ĉi-tieaj samidenaĵoj, kiuj kolektiĝis en la societo por komenci decidan laboron. Al ĉi tiu nova societo ni deziras plej bonan progreson.”

En la numero 23, de la 8-a de majo 1909 ni legas, ke la societo konstituiĝis, kaj ke komenciĝis la kurso por 60 personoj. Tamen, tiu pionira tempo ne estis facila, ĉar poste oni informas, ke la kurson regule vizitadis nur dudeko da kursanoj, kaj en oktobro samjare legeblis, ke pluraj eksaj kursanoj faras malbonan propagandon kontraŭ Esperanto. Tamen, ĉiuj ĉi aferoj ne delogis la redakcion de *Nezavisnost* enkonduki

regulan rubrikon pri Esperanto. La unuan fojon ĝi aperis en la n-ro 50, la 3-an de novembro 1909, kaj ĝi konsistis el pluraj artikoloj, parte en Esperanto, kaj la tekstaŭtoro estis subskribita per *Krom*. La redakcio enkonduke artikolis: „*La sukcesoj kiuj ĝis nun estis atingitaj per helpo de ĉi tiu internacia lingvo, kaj ĝia disvastiĝo dise tra la mondo, instigis nin, ke ni kiel la unua gazeto en Kroatio iom pli detale okupiĝu pri tiu ĉi facila lingvo, kaj ke niajn estimatajn legantojn kiel eble pli multe ni informu pri tiu lingvo. Feliĉon al ili.*”. Kvankam la regula rubriko nelonge daŭris, tamen *Nezavisnost* publikigis preskaŭ regule informojn pri Esperanto ĝis la komenco de la unua mondmilito. Unu el la plej longaj artikoloj aperis la 2-an de decembro 1911 kaj traktis la romanon *La trezoro de l' oraĵisto*, tradukitan de Fran Kolar – *Krom* tujare, respektive la recenzon en la pariza *La revuo*.

Post la milito Fran Kolar *Krom* translokiĝis al Zemun, kaj en Bjelovar restis iaspeca vakuo. Pri la unuaj spuroj de reviviĝo informas la gazeto *Konkordo* (1/1924) jene: „*Dank' al la fervoreco de s-roj D-ro Peičić, Poljan, Křepelka, Došek kaj la aliaj estis fondita esper. societo Bjelovar*” (la refondo de la societo okazis en 1922). La societa prezidanto estis d-ro Vilim Peičić, sekretario Dragutin Došek kaj komitatanoj: Franjo Poljan, Ivan Křepelka kaj profesoro Rudolf Schey (Ŝaj), kiu gvidis plurajn kursojn en la gimnazio kie li laboris. La kunvenejo estis la razejo de s-ro Došek.

Dek jarojn post la refondo de la societo, en la urbon venis prof. Fran Novljan, kiu fariĝis diversflanka kultura aganto. Li organizis multajn bone vizitatajn prelegojn pri diversaj kulturaj kaj edukaj temoj, kaj la plej grandan sukceson havis la prelegvojaĝo de negro Kola Ayaji, kiu en 1933 prelegis en la loka kinejo *Metropol*. Tamen, profesoro Novljan restis en Bjelovar tre mallonge, kaj jam en 1933 li translokiĝis al Nova Gradiška.

La 19-an de aprilo 1938 la societa laboro estis malpermesita kaj la havaĵo konfiskita. Nova provo refondi la societeton okazis jam en 1939, sed la polico malaprobis la peton. Dum tiu tempo, samkiel en la tuta lando, en Esperanto-societoj tre aktivis laboristoj socialisme orientitaj, respektive ankaŭ inter bjelovaraj esperantistoj troviĝis postaj revoluciuloj Julius Ecker, Nikola Bakić, Franjo Gajski kaj Tomo Vinković.

La renaskiĝo de la loka movado post la dua mondmilito estis ebla aparte pro la engaĝiĝo de fervorulo Dragutin Štokić, kiu kunvokis la malnovajn esperantistojn, kiuj la 22-an de aŭgusto 1945 refondis la societeton (24 personoj). La prezidanto fariĝis Ivan Urek, vicprezidanto Leopoldina Vinković, sekretario Zlatko Ĉuković, kasisto Milivoj Lalić. Štokić estis membro de la kontrolo komitato, kaj en tiu societo

ekaktivis ankaŭ Vilim Polašek, kiu poste havos la ŝlosilan rolon ĝis la 1990-aj jaroj.

La unuan kurson post la dua mondmilito gvidis Ilona Ficko kaj Milivoj Lalić (en 1945). Dragutin Štokić organizis en la societo kordmuzikan orkestron por infanoj, kiuj samtempe lernis Esperanton. En kelkaj sekvaj jaroj tiu orkestro (=sekcio) faris plurajn koncertojn kaj turneojn. Fine, la societa orkestro aliĝis al kultur-arta societo *Golub*.

En 1951 la societa estraro konsistis el: prezidanto Dragutin Štokić, vicprezidanto Stjepan Maltar, sekretario Vilim Polašek, kasistino Štefica Kralj, bibliotekistino Đurđa Stazić kaj estrarano por instruado Marija Imbrišić. Sekvontjare (1952) la estraro konsistis el: prezidanto Ivan Urek, vicprezidanto Milan Pajtak, sekretario Vilim Polašek, kasistino Štefica Kralj, bibliotekisto Ladislav Režek, estrarano por instruado Marija Imbrišić, kaj estrarano por turismo Stjepan Maltar.

Renkonte al la Universala Kongreso en Zagrebo (1953), la societo tre aktivis, kaj unu el la plej grandaj eventoj estis okazigo de impona ekspozicio en la Urba muzeo. Post la UK la societa laboro stagnis, ĉar la societo ne posedis propran ejon. En 1955 la estraro konsistis el: prezidanto Ivan Urek, vicprezidanto Milan Pajtak, sekretario Vilim Polašek, kasistino Štefica Kralj.

En la periodo ekde 1960-aj ĝis 1990-aj jaroj en la loka gazeto *Bjelovarski list* aperadis centoj da artikoloj pri Esperanto, rimarkeble sub influo de la sekretaria laboro de Vilim Polašek. Regule aperadis informoj pri kursoj, prelegoj kaj vizitoj de eksterlandaj samideanoj.

En la komenco de 1960-aj jaroj, konforme al la tiutempa socia populareco, ankaŭ inter esperantistoj ekregis tradicio de laborbrigadoj. Organizitaj de JEJA, la esperantistaj laborbrigadoj altiris ankaŭ partoprenon de bjelovaraj junaj esperantistoj. En 1958 en la unua laborbrigado partoprenis ses, en la dua en 1959 kvar geesperantistoj el Bjelovar ktp.

En tiu periodo, la plej grandan impulson Esperanto havis inter gejunuloj. La societa sekretario Vilim Polašek instigis ilin aktivi diversmaniere. En septembro-oktobro 1963 aperis la unua numero de *Juna Ambasadoro*, organo de junulara grupo de Esperanto-societo Bjelovar. „Junaj ambasadoroj” estis infana grupo de Esperanto-societo Bjelovar (funkcianta ekde 1962), kies organizanto estis junulo Franjo Forjan. La grupo komence konsistis el trideko da fervoraj infanoj-esperantistoj (10-15-jaraj), kiuj estis en kontakto kun esperantistoj el la tuta mondo, kaj ĉiu estis taskigita pri alia lando. Pri siaj korespondadoj kaj kontaktoj kun eksterlando ili faris prelegojn en

pluraj bjelovaraj lernejoj. Franjo Forjan redaktis la stencilitan gazeton *Juna Ambadoro*, kaj grandan parton de teknika laboro faris Vilim Polašek. Inter 1963 kaj 1977 aperis 86 numeroj. Pro la tiutempa aktiva laboro inter la gejunuloj, ankaŭ nuntempe en Bjelovar svarmas scioj pri Esperanto. El tiu amaso da gejunuloj, pluraj restis tre aktivaj, kaj sekve ili nuntempe estas membroj de la loka societo. En la jaro 1964, la junulara sekcio eĉ ricevis transiran pokalon de JEJA (Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio) kiel la plej aktiva junulara societo en Jugoslavio. En la periodo ĉirkaŭ 1980-aj jaroj, Esperanto estis favore taksata de la tiama Asocio de socialisma junularo, kaj la junularaj aktivecoj estis tre intensaj. Sekve, ankaŭ bjelovaraj junaj esperantistoj vojaĝis (ĉefe al IJK-oj), partoprenis seminariojn ktp.

Kune kun aliaj regionaj esperantistoj kaj Esperanto-societoj, en 1980 estis formita Koordina komitato de esperantistoj en Komunumaro Bjelovar, kaj la 12-an kaj 13-an de decembro 1980 estis organizita la 1-a renkontiĝo de esperantistoj de la Komunumaro en Bjelovar.

Okaze de la 75-a jariĝo post fondo de la unua societo en Bjelovar, en 1984 la Esperanto-societo aldonis al sia titolo la nomon de revoluciulo Tomo Vinković. Tamen, iom post iom la societa laboro malfortiĝis, kaj post perdo de la societejo en 1992 la societo ĉesis ekzisti.

Kvankam en Bjelovar restis multaj individuaj esperantistoj, ili plejparte pasiviĝis. En 2011, la 14-an kaj 15-an de majo, okazis en Bjelovar la brile sukcesinta 9-a kongreso de kroataj esperantistoj, kiel rezulto de intensa laboro de grupo da malnovaj samideanoj. Rezulte de tiu aranĝo, jam la 10-an de septembro (re)fondiĝis Bjelovara esperantista societo (Društvo esperantista Bjelovara, DEB), kies prezidanto fariĝis Franjo Forjan, sekretariino Grozdana Grubišić-Popović, kasistino Ljerka Stilinović kaj estraranoj Berislav Rubčić kaj Nenad Margetić. Ekde tiu momento komenciĝis plurjara flora periodo de la loka movado, kiu respeguliĝas en multaj diversaj aranĝoj kaj aktivecoj. Regule okazas la aranĝo *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*, deklamkonkursoj, festado de Zamenhofaj tagoj, ekskursoj, eldonado de libroj, kaj pasintjare okazis tre sukcesa festivalo INTER-FEST, la unua granda internacia Esperanto-aranĝo en la tuta longa historio de Esperanto en la urbo. Sur la sama vojo okazas ankaŭ la 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco.

Josip Pleadin

Programo de la Konferenco

Konferencujo: Urba Muzeo de Bjelovar, Trg Eugena Kvaternika 1

Vendredo, la 8-an de junio

- 12h00 **Sidejo de Bjelovara Esperantista Societo:** Ivana viteza Trnskog 12: Akcepto de partoprenantoj, disdonado de dokumentoj, loĝigo.
- 16h00 Vizito de la urbo kaj de la ekspozicio *De Arnoldstein ĝis Bjelovar*, pri urboj gastigantoj de pasintaj Konferencoj en la Popola Biblioteko *Petar Preradović*, Trg Eugena Kvaternika 11.
- 19h00 Interkona vespero en la Dolĉaĵejo *Zagorje*, Ivana Viteza Trnskog 15.

Sabato, la 9-an de junio

- 9h00 **Urba Muzeo de Bjelovar**, Trg Eugena Kvaternika 1: Akcepto de partoprenantoj, disdonado de dokumentoj.
- 10h00 Plantado de *Arbo de internacia amikeco* en la parko ĉe Trg Stjepana Radića. Tuj post la plantado de la Arbo, okazos komuna fotado de ĉiuj konferencanoj ĉe la Pavilono en la ĉefa urba parko.
- 11h00 Oficiala malfermo de la 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco. Salutoj de la organizantoj, aŭtoritatoj kaj reprezentantoj de la grupoj.
- 12h00 Prelegoj pri konferencaj temoj kaj diskutoj. Inter la prelegoj okazos muzikaj programeroj plenumataj de Marta Ĉuković, lernantino de Muzika lernejo *Vatroslav Lisinski* el Bjelovar.
- 14h00 Lunĉo rapida (senpaga por ĉiuj aliĝintoj).
- 15h00 Ĝenerala Asembleo de Esperanto-Rondo de Alp-Adrio.
- 17h00 **Hotelo Central**, Vatroslava Lisinskog 2: Malfrua tagmanĝo.
- 18h00 Kultura kaj amuza programo kun koncerto de Neven Mrzlečki, koruso *Főnix* el Komló (Hungario), kaj recitado de Esperanta poezio. En la Hotelo funkcios ankaŭ la konferenca libroservo.

22h00 Fermo de la Konferenco kun salutoj al forirantaj partoprenantoj.

Dimanĉo, la 10-an de junio

9h00 Ekskurso al Daruvar: vizito de la urbo, vin-foiro kaj sinbanado en la termalbanejo.

16h00 Foriro de partoprenantoj.



Marta Ĉuković

gitaristino, 4-a klaso de elementa lernejo

Repertuaro:

T. Tisserand: *Broceliande*

A. Lauro: *Venezuela danco n-ro 1*

Trejnita de **prof. Siniša Pauška.**

Konferencaj temoj

Urba Muzeo de Bjelovar

Trg Eugena Kvaternika 1

Sabato, la 9-n de junio je la 12h00

UNUA TEMO: Alp-Adrio kaj Danubio

12h00 Unua prelego – Edvige Tantin Ackermann (Italio):
Alp-Adrio kaj Danubio – eŭropaj regionoj

12h10 Dua prelego – Anton Mihelič (Slovenio):
Iniciato por komuna agado de esperantistoj en la regiono Alpoj-Danubo-Adrio (ADA)

12h20 Tria prelego – Janez Zadavec (Slovenio):
Pasintaj atingoj, nunaj cirkonstancoj kaj estontaj eblecoj

12h30 - 12h50 Diskutoj pri la unua temo.

DUA TEMO: Publikaj rilatoj de esperantistoj kun neesperantistaj medioj

13h10 Unua prelego – Josip Pleadin (Kroatio):
Rilatoj kun neesperantistaj medioj – bjelovaraj spertoj

13h20 Dua prelego – Anton Oberndorfer (Aŭstrio):
Esperanta retradio

13h30 Tria prelego – Mária Eszes (Hungario):
La kontakto de la religio kaj la arto

13h40 - 14h00 Diskutoj pri la dua temo.

Generala asembleo

Urba Muzeo de Bjelovar

Trg Eugena Kvaternika 1

Sabato, la 9-an de junio je la 15h00

TAGORDO

1. Raporto pri la antaŭa asembleo
2. Raportoj pri agadoj de la grupoj kaj unuopuloj
3. Respondeculoj pri la diversaj regionoj de Alp-Adrio: nomoj, adresoj, fakso, e-poŝto
4. Proponoj por agado ĝis la venonta Konferenco
5. 21-a Konferenco: kie, kiam, kia temo



Brežice, 2017

Kultura programo

Hotelo Central

Vatroslava Lisinskog 2

Sabato, la 9-an de junio je la 18h00

Esperanta koncerto de Neven Mrzlečki el Zagrebo



Repertuaro:

1. Tumbalalajka
2. Dona dona
3. Jerusalem' de vera or'
4. Ravegaj tagoj
5. Voĉe de gitaro mia
6. Samba de mia espero
7. Guantanamera
8. La hirundo
9. La reĝino
10. Mia feino
11. Memoru min
12. Laro kaj mi
13. Liberas la pens'
14. Ĉiuj floroj estas for
15. Vi levas min

Neven Mrzlečki (1958) estas profesia operkantisto tenorvoĉa, membro de la Opero de la Kroata Nacia Teatro en Zagrebo, kie li kantas diversajn rolojn en operaj spektakloj (Verdi, Puccini, Bizet, Mozart, Ĉajkovski). Li diplomiĝis en 1983 en la Muzika akademio de Zagrebo pri solkantado. Kiel multjara esperantisto (ekde 1972), li ofte gastas en diversaj Esperantaj aranĝoj kun varia repertuaro.

Hotelo Central

Vatroslava Lisinskog 2

Sabato, la 9-an de junio je la 18h40

Koncerto de la Koruso *Főnix* el Komló (Hungario)



La *Főnix* ĉambrokoruso de la „Respekto al Komlo Unuiĝo” estis fondita en 2011. La ĥorestrino estas s-ino Mária Csonka kaj la manaĝerino estas la prezidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio, s-ino Mária Eszes.

La koruso kantas plurlingve, en ilia repertuaro estas mondaj, ekleziaj ĥormuzikoj kaj popolkantoj. Ili kantis dum la festoj de la ministoj en urbo Komló, en la Arta Rondo en urbo Pécs, dum la kulturaj aranĝoj de la civilaj organizoj en Budapeŝto, en tuta lando okaze de ekspozicioj kaj libroprezentadoj, en preĝejoj kaj en la hejmoj de maljunuloj. Ili prezentiĝis dum folkloraj festivaloj kaj en literaturaj rondoj.

Ili kantis Esperante okaze de Zamenhof-festo, kiun organizis la Hungaria Esperanto-Asocio, kaj en la Tagoj de Eŭropaj Lingvoj en Budapeŝto.

La plej granda honorigo por la koruso estas la diplomo, kiun ĝi ricevis en la Eŭropa Aranĝaĵo-ŝipo en Budapeŝto. Ĉi tiun transdonis la profesoro de la Jagelona Universitato (Krakovo) pro la altnivela programo de la koruso okaze de IMEK (Internacia Medicina Esperanto Kongreso).

La koruso kantis ekleziajn kantojn dum la Kongreso de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista en urbo Pécs.

Iliajn Esperantlingvaj kantojn oni povis aŭskulti ankaŭ en Suda Koreujo okaze de la 102-a Universala Kongreso.

Repertuaro:

Laŭdu ĉiu nacio
Kanto de Esperanto – Domo de Jacugatake
La kri'
Vivu la verda stel
Sub la montoj de Ĉitaro
Kuirejon mi rapidis
Vent' printempa
O brilanta stelar' – lumo de ĉielo
Puto eta
Flamo de amo (*poemo de Maria Eszes*)
Estu paco (*hungarlingve*)
Esperanto estas la lingvo por ni

Sinceran dankon!

Sinceran dankon al la aŭspicanto kaj niaj donacintoj kaj kunlaborantoj, kiuj ebligis, ke la 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco fariĝu memorinda evento.

Loka organiza komitato



URBO BJELOVAR

Trg Eugena Kvaternika 2
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 622 000



URBA MUZEO DE BJELOVAR

Trg Eugena Kvaternika 1
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 244 207



MUZIKLERNEJO VATROSLAV LISINSKI

Ul. Vatroslava Lisinskog 1
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 243 416

CVJETNI ATELJE
MARINA

FLORA ATELIERO
MARINA

Ul. Vatroslava Lisinskog 4,
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 243 444



HOTELO CENTRAL

Ulica Vatroslava Lisinskog 2, 43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 243 133



POPOLA BIBLIOTEKO
PETAR PRERADOVIĆ

Trg Eugena Kvaternika 11
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 243 065



KAFEJO KAJ DOLČAJEJO
ZAGORJE

Ulica Ivana viteza Trnskog 15
43000 Bjelovar
Telefona: +385 43 244 333



**TURISMA UNIIĜO
BILOGORA-BJELOVAR**

Trg Eugena Kvaternika 2
43000 Bjelovar
Telefono: +385 43 243 944
Retadreso: info.tzbb@gmail.com



**TURISMA UNIIĜO
DARUVAR-PAPUK**

Trg kralja Tomislava 12
43500 Daruvar
Telefono: +385 43 33 13 82
Retadreso: turizam@daruvar.hr



Ul. Matice hrvatske 24, 43000 Bjelovar
Telefono: +385 43 244 050



OŠKERA d.o.o.

Ul Stjepana Radića 3
43212 Rovišće
Telefono: +385 43 878 571



Bjelovara esperantista societo
invitas vin ankaŭ al la

6-a renkontiĝo
Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo
septembre 2018

Temo:
Bjelovaraj esperantistoj kiuj famigis la urbon

7-a renkontiĝo
Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo
septembre 2019

Temo:
110-a datreveno de Esperanto en Bjelovar

Pliaj informoj:
www.esperanto-bjelovar.hr